

Ilona Koutny

## Esperantlingva bildo de la mondo

### Resumo

La studo – surbaze de reta enketo – provas prezenti diversajn aspektojn de la esperantlingva bildo de la mondo kaj serĉos respondon al la demando, kiomgrade la elektitaj terenoj estas influataj de la fontolingvoj de Esperanto, de la gepatra lingvo de esperantistoj kaj kiom ili fontas el la specifa strukturo kaj kulturo de Esperanto mem.

En la gramatika sistemo esploras: la seksismaj trajtoj; la fiksiĝo de specifaj, prototipaj signifoj ĉe derivitaj vortoj; la produktivo de bazaj vortoj. Enkadre de la leksiko analizatas: kolornomoj; kulturdependaj vortoj kaj esprimoj; la signifometafariĝo; lingvaj stereotipoj. Ankaŭ la pragmatika flanko kiel elvokivo kaj ĝentileco estas prezentata.

### 1 Enkonduko

La lingva bildo de la mondo estas interesa kaj riĉa esplortereno: ĉiuj lingvoj iom alie mapas la mondon kaj eluzas diversajn strukturojn por redoni similan enhavon. La homa kulturo speguliĝas en la lingvo, kaj siavice la uzata lingvo influas la pensadon, donas iujn kadrojn por percepti la fizikan kaj spiritan mondon.


Diversaj flankoj de la lingva bildo estos prezentataj, kaj kelkaj karakterizaj eroj analizatos en Esperanta kunteksto. Mi serĉos respondon al la demandoj, kiomgrade la elektitaj terenoj estas influataj de la fontolingvoj de Esperanto – de la eŭropa kultursfero, de la gepatra lingvo de esperantistoj, kaj kiomgrade ili fontas el la specifa strukturo de Esperanto mem, kiajn lingvajn manifestiĝojn havas la Esperanta kulturo.

Limigita eksperimento, reta traserĉo kaj serĉo en la limigita Esperanta tekstaro (pli ol du milionoj da vortoj el elektitaj Esperanto-tekstoj far Bertilo Wennergren) subtenas kelkajn miajn konstatojn. Tra la reto 100 esperantistoj respondis al miaj demandoj, kiuj rilatis al strukturo, senco kaj kromsenco de Esperantaj vortoj kaj vortkombinoj. Temas pri esperantistoj, kiuj – laŭ sia propra pritakso – almenaŭ meze bone parolas Esperanton kaj sufiĉe ofte uzas ĝin (plurfoje monate). 93%-oj el ili scipovas almenaŭ unu fremdan lingvon krom la gepatra kaj Esperanto (34%-oj eĉ lingvo(j)n el alia lingvofamilio ol sia propra), kio komplikas la influojn al la uzo de Esperanto. Jen sekvapaĝe ilia divido laŭ gepatraj lingvoj (figuro 1) kaj profesio (figuro 2).

Ne troviĝas sufiĉe da ekstereŭropanoj por esence kontrastigi la eŭropan bildon (nur 8%), sed ankaŭ la hungara lingvo (ĉi tie 20%-oj de la enketitoj) ne apartenas al la hindoeŭropa lingvofamilio. La divido laŭ profesioj same ne estas ekvilibra: la nombro de instruistoj kaj personoj kun supera edukiteco estas pli alta ol kutime ĉe naciaj lingvoj, sed verŝajne karakterizas la tavolon de retumantoj. Cetere ankaŭ aliaj enketoj pri esperantistoj entenas pli da instruistoj ol proporcie en la socio (19,7% de la delegitoj laŭ Piron 1989b). La lingvoscio estas multe pli alta ol kutime. Entute ne temas pri averaĝaj esperantistoj, sed tamen eble tipaj (Melnikov 1992 enkondukas la nocion de *tipa esperantisto* por trakti la fonajn sciojn en Esperanto). Do la sampla el neniu vidpunkto estas reprezenta, tamen sugestas tendencojn.

### 2 Pensado – lingvo – kulturo


Por povi paroli pri la – ekstera aŭ interna – mondo, oni bezonas nomi la realajn aŭ imagatajn objektojn, vivaĵojn, agojn, sentojn kaj abstraktajn nociojn. La vortoprovizo de iu lingvo en iu epoko spegulas la materian kaj spiritan kulturon de ĝiaj uzantoj. Esplorante restaĵojn de



Figuro 1: Divido de la enketitoj laŭ gepatraj lingvoj

Rimarko 1: 4 personoj konsideris ankaŭ Esperanton kiel sian gepatran lingvon (3 krom la germana, 1 krom la rusa). Mi metis ilin en la grupon de ilia alia gepatra lingvo, sed ĉe certaj problemoj mi speciale rigardis ilian opinion, ĉu estas esenca diferenco inter ili kaj la aliaj membroj de la grupo.

Rimarko 2: 7 respondoj venis el Azio (el kiuj 4 japanoj) kaj nur 1 el Afriko, 15 enketitoj havas latinidan gepatran lingvon, 35 ĝermanan, 19 slavan kaj 20 la hungaran, po 1 la finnan, litovan kaj hebrean.



Figuro 2: Divido de la enketitoj laŭ profesioj

Rimarko 1: La profesiojn de enketitoj mi grupigis en la sekvajn kategoriojn: instruisto (ĉiuj tipoj, se la fako ne estis precizigita), ĉe universitataj instruistoj, se la fako estis donita, laŭ tio; filologo (lingvisto, tradukisto), natursciencisto, informadikisto (ankaŭ matematikisto), inĝeniero (ankaŭ teknikisto), redaktisto (ankaŭ eldonisto, ĵurnalisto), kuracisto (ankaŭ apotekisto, laboristo en sanservo), oficisto, ekonomikisto, komercisto, agrikulturisto, verkisto, studento (lernanto), dommastrino, senlaborulo (se ne donita la antaŭa profesio), pensiulo (se ne donita la antaŭa profesio). Ĉiuj pensiuloj cetere konsistigas 14%-ojn (tamen emerita instruisto aperas en la grupo de instruistoj).

Rimarko 2: En pluraj kazoj necesis elekti inter la donitaj profesioj, ekz. inĝeniero/instruisto/ informadikisto.

malnovaj lingvaj fragmentoj, oni povas ekhavi informojn pri la vivmaniero kaj vivmedio de iu popolo (vestaĵoj, uzataj iloj, ĉirkaŭantaj floroj kaj bestoj, stato de teknika evoluo, sociaj rilatoj). Depende de la ŝanĝo de vivmaniero aperas kaj malaperas vortoj, sed parto povas transvivi en la frazeologiaĵoj (ekz. *la suno leviĝas*).

La vortoprovizo kaj frazeologiaĵoj de iu lingvo spegulas ankaŭ rilatojn inter la realaĵoj kaj nocioj, la specifan aliron, la mondkoncepton de ĝiaj parolantoj. Ekzemple la hungara lingvo havas komunan vorton *hagyma* por *cepo*, *ajlo* kaj *poreo* (por precizigi oni antaŭmetas *vörös-ruĝa*, *fok-* kaj *póré-* al *hagyma* kaj *zöld* ‘verda’ por la novaj cepoj), tio prezentas la popolan scion, kiu ne nepre koincidas kun la scienca klasifiko. *Arbo* kaj *ligno* konsistigas unu nocion en la hungara vorto *fa* (simile la japana *ki*), eĉ distingo lingva inter *li* kaj *ŝi* ne ekzistas, unu pronomo *ő* plenumas la rolon de la 3-a persono singularo. La pola *ser* povas signifi *kazeon* aŭ *fromaĝon* (por precizigi oni antaŭmetas *biały* ‘blanka’ aŭ *żółty* ‘flava’). Similajn diferencojn eblas trovi multe. La mapado de la realaĵo al la lingva ebena diferencas de lingvo al lingvo, montras specifan aliron de iliaj parolantoj. Frazeologiaĵoj kaj proverboj havas sian mondon, ili estas kompreneblaj kutime nur baze de kultura fono.

Aliflanke la lingva strukturo, ĝiaj kategorioj influas nian pensadon. Jam Johann Gottfried Herder kaj Wilhelm von Humboldt montris tion. Humboldt konsideras, ke la lingvo estas speciala esprimilo de la spirito de la nacio, la lingva bildo de la mondo estas la kompreno kaj interpretado de la mondo laŭ la racio, sumigo kaj sistemigo de la spertoj, normoj, valoroj de ĝiaj parolantoj (Bańcerowski 2003). La usonaj antropologoj kaj etnolingvistoj esploris la interrilaton de lingvo kaj pensado, ili konstatis la interrilaton de lingvo kaj kulturo. Ekde Sapir kaj Whorf la *lingva relativismo* estas vaste konata. La lingvo kiel la rezulto de ekkona procezo, entenas mondkoncepton, kaj la mondkoncepto determinas la ekkonon kaj la manieron koncepti la mondon far la homo.

Lingvo kaj pensado ne disigeblas kaze de gepatra lingvo, oni lernas la mondon koni kune kun la lingvo dum la t.n. ensociiga procezo. La lingvo iĝas sinesprimilo, komunikilo kaj identigilo. La situacio estas pli komplika ĉe plurlingvuloj: Kiomgrade ili funkcias laŭ la skemoj de la gepatra lingvo (se entute nur unu estas konsiderata kiel tia, ja povas temi pri apartaj patra kaj patrino lingvoj), kaj laŭ tiuj de la alia(j) lingvo(j)? Kaze de Esperanta dulingveco, kutime, temas pri aldona lingvo kaj kulturo, eĉ ĉe denaskuloj, ĉar ili estas pli vaste influataj de la lingvo kaj kulturo de la gepatroj kaj de la vivmedio. Kiam oni lernas fremdan lingvon, oni alfrontas la diversecon de lingvaj bildoj kaj kulturoj.

La lingva bildo de la mondo aperas en diversaj flankoj de la lingvo. Eblas spuri ĝin en la gramatiko, leksiko, frazeologio kaj pragmatiko (Anusiewicz k.a. 2000 proponas ampleksan kadron por esploroj).

Leviĝas la demandoj: Ĉu Esperanto entute prezentas iun propran bildon de la mondo aŭ nur spegulas aliajn; se jes, kian, kaj kiun rilaton tio havas kun la lingva bildo de aliaj lingvoj, kaj ĉu ni pensas en tiuj specialaj kategorioj, kiam ni uzas Esperanton?

Homoj ne konantaj Esperanton ofte objektas, ke ĝi ne havas kulturon. Tamen la lingvokomunumo – dum sia pli ol centjara ekzistado – nature kreis sian karakterizan kulturon. Kvankam ĝi ne estas tiel ampleksa kiel la naciaj kulturoj, ĉefe la ĉiutagaj aferoj, realaĵoj praktike mankas (kp. Koutny 1998), ja Esperanto konsistigas la duan kulturon por siaj parolantoj, kiuj ĉiuj vivas en etnolingvaj socioj. Esperanto funkcias ĉefe en internacia kaj interkultura komunikado. La Esperanta kulturo plenumas similan rolon al la naciaj, ĝi estas la bazo por efika komunikado, kompreno de literaturaĵoj kaj ŝercoj. Melnikov (1992, 2001, 2003 kaj 2004) konstatas surbaze de siaj esploroj, ke Esperanto-kulturo trovis sian respeguliĝon en la lingvo, unuavice en la kulturŝarĝitaj vortoj.

### 3 Lingva bildo de la mondo en gramatiko

La gramatikaj genroj kategoriigas la estaĵojn. Tio havas influon al la deklinacio de la substantivo mem kaj de la akompanaj adjektivoj kaj eventuale al la konjugacio de la verbo kies subjekto estas la koncerna vorto (en slavaj lingvoj) kaj ankaŭ al la metaforiĝo de la vortoj (vd. 4.3).

Se iuj bazaj vortoj rilatas al iu sekso, kaj la alia sekso atingeblas per vortfarado, tio levas la problemon de lingva seksismo. La germanaj vortoj *der Lehrer* ‘la instruisto’, *der Schauspieler* ‘la aktoro’, *der Arzt* ‘la kuracisto’ rilatas al viroj, kaj la virinaj formoj estas derivitaj de ili per la sufikso *-in*: *die Lehrerin*, *Schauspielerin*, *Ärztin*. Tiel la mondo dividiĝas konstante je viroj kaj virinoj. La vortkreado ĝenerale montras rilatojn inter diversaj nocioj kaj iliaj vortigoj.

La pasiva voĉo esprimas distanciĝon de la agado. Tie, kie ĝi ne ekzistas, ekz. en la hungara, la agado kutime rilatas al la aganto(j). Ankaŭ la vortordo kaj la temo-remo-strukturo (konata – nekonata en la komunikado) karakterizas la aliron de la lingvo.

#### 3.1 Seksismo

En Esperanto ne ekzistas genro, tamen la problemo de sekso aperas ĉe vortoj, kiuj rilatas al homoj. Okazas diskuto pri ilia virseksa aŭ neŭtrala (ĝenerala) signifo. La unua aliro konsideras la bazajn vortojn virseksaj, kaj la virinajn formojn markitaj, ja ili estas derivitaj de la virseksaj vortoj per la sufikso *-in-*. Por reprezenti ambaŭ seksojn la prefikso *ge-* devas esti uzata: *vidvo* – *vidvino* – *gevidvoj* (Fischer 2003, en sia detala studo pri la seksa sistemo de Esperanto, nomas tion *seksodomina tipo*, *ge-* estas ĝeneraligita el la germana). Eblas konsideri la bazajn formojn viraj speciale kaj neŭtralaj ĝenerale, tiel ilia pluralo estas kutime neŭtrala; la virinaj formoj derivendas: *najbaro* – *najbarino* – *najbaroj* (laŭ Fischer *seksoinkluziva tipo*, tiel funkcias la franca lingvo). Ambaŭ sistemoj donas al la lingvo seksisman karakteron, ĉar la viraj formoj estas primaraj. Ambaŭ solvoj havas la problemon kiel paroli pri unuopa persono unusence sen seksa distingo.

La sekva aliro konsideras la bazajn vortojn neŭtralaj kaj uzas la sufikson *-in-* por precizigi la virinan sekson. Tiel aperas bezono por marki la virecon: ekzistas propono en la formo de la sufikso *-iĉ-*, kiu igus la sistemon simetria: *aktoro* – *aktoriĉo* – *aktorino* – *aktoroj*. Tiel la pluralo de la baza vorto estas ĝenerala. La kutima solvo ĉe bestoj kun la antaŭmeto de *vir-* ne simetrias kun la virina sufikso *-in*. Aliaj proponas krome novan pronomon *ri* anstataŭ aŭ krom la pronomoj *li* kaj *ŝi*. Tiel forigante el la lingvo seksismon ĉi lastaj kredas kontribui al la neseksisma pensado (kp. <http://www.pvv.org/~ulflunde/Eo/icxismo.html>).

La problemoj leviĝas ĉe bazaj vortoj kaj ĉe derivitaj per *-an-*, *-ant-*, *-at*, *-estr-*, *-id*, *-ist-*, *-ul-* aŭ per simpla *-o*. Kelkaj bazaj vortoj efektive origine entenas la signifon ‘viro’, kiel *patro*, *frato*, *edzo*, *sinjoro* kaj *viro* mem aŭ la signifon ‘virino’, kiel *damo*, *madono*. Wennergren donas liston de tiuj vortoj en sia TTT-paĝo kaj prave rimarkigas, ke la aparteno al tiuj grupoj dependas de la propra signifo de la radiko. Kelkaj tamen estas diskutendaj: kial *nepo* kaj *orfo* estus viraj radikoj, aŭ ĉu vere la profesinomoj (*aktoro*, *kelnero*, *studento* ktp.) estas neŭtralaj? Militistoj kaj religiuloj kutime estis viroj, tial ilia tradicia signifo supozeble entenas la virecon.

La derivitaj vortoj komence pli sekvis la aliron, kiu atribuas al ili viran signifon, kaj por atingi la virinan formon, postulas la *-in-*sufikson. Ĉu tio ankaŭ nuntempe validas? Por decidi pri la ĝusta formo ne sufiĉas referenci al Zamenhofaj tekstoj, sed necesas esplori la efektivan lingvouzon. Esperanto evoluis dum la pasintaj pli ol 100 jaroj: ekz. kelkaj formoj plisimpliĝis, plimallongiĝis kiel *organizo* anstataŭ *organizaĵo*, *eblo* anstataŭ *ebleco*. Certasence al tiu tendenco apartenas la forlaso de *ge-* kaj la uzo de la baza formo en neŭtrala

senco por paroli ĝenerale pri homoj (*En la universitato studas multaj studentoj. Poloj loĝas en Pollando kaj Usono.*)

Por la enketo mi elektis nur kelkajn problemojn. Mi esploris la uzon de *-ant*, *-ul* kaj *-o*. Ne eblas tiri unusencan ĝeneralan konkludon pri **ant**-vortoj, ĉar la uzo dependas de la tuta vorto, ne nur de la finaĵo: la vorto *loĝantoj* estas uzata en ĝenerala senco (neniu uzis la formon *geloĝantoj*, same ne troviĝas en la Esperanto-tekstaro). La retaj trafoj konfirmis tion (troviĝis tamen 6 trafoj por *geloĝantoj* kontraŭ 8412 – kompreneble ĉi-kaze ne ĉiam temas pri ĝenerala uzo!). La vorto *gelernantoj* estas uzata (5%), kvankam la uzo de *lernantoj* evidente gajnas (30%, sesfoje pli multe kaj en la enketo kaj en la reta serĉo, en Esperanto-tekstaro 62 kontraŭ 24 trafoj).

Koncerne **ul**-vortojn la diferenco estas malpli granda: *junuloj* (66%) estas ĉ. 2,5-foje pli ofte uzataj en ĝenerala senco ol *gejunuloj* (27%). Ankaŭ la reta retrovo proksimigas tiun rezulton kaj la Esperanto-tekstaro kun duobla nombro da trafoj. Estus tamen tro frue konkludi, ke *-ul* estas pli vira ol *-ant*. Menciindas la uzo de *ar*-vortoj en la ĝenerala senco: *loĝantaro*, *junularo*. Ĉe la simpla **o**-vorto de nacio-nomo kiel *francoj* la ĝenerala senco estas evidenta, *gefrancoj* apenaŭ aperas (2 kontraŭ 88, en la reto 12 kontraŭ 978, en la Esperanto-tekstaro 0).

La uzo de *ge*- aperas ĉe diverslingvanoj, ne eblas konstati iun influon de la gepatra lingvo. Krome estas diferenco inter la singulara kaj plurala uzoj de vortoj koncerne la sekson, sed la enketo pri tio ne disponigas datumojn. La pluraloj *loĝantoj*, *lernantoj*, *junuloj*, *francoj* estas pli facile akcepteblaj kiel neŭtralaj formoj ol iliaj singularoj: virino prefere diras: *mi estas hungarino* ol *hungaro*, *junulino* ol *junulo*, *lernantino* ol *lernanto* kaj en la literaturo abunde troveblas tekstoj, kie *junulo* signifas viron.

*Membro*, *gasto*, *aliĝanto*, *uzanto* ktp. ŝajnas esti neŭtralaj, kvankam eblas trovi sporade virinajn formojn en la reto. La fakto, ke la baza vorto iĝas neŭtrala, montras tendencon vidi la mondon malpli rekte seksisme.

La vorto *patrujo* (Pl *ojczyzna*, Fr *patrie*, Ge *Vaterland* krom *Heimat* [hejmlando], An *homeland*; en la rusa eblas du formoj: unu rilata al patro *otĉizna* kaj la alia al patrino *rodina mat'*) montras spurojn de la patriarka socio, kie la rolo de viroj estas pli grava. Same bone en Esperanto povus funkcii *gepatrujo* analoge al *gepatra lingvo*, tamen ĉi tie restis *patrujo* pro la fontolingvaj influoj.

## 3.2 Vortfarado

Iuj lingvoj pli ofte enkondukas novajn vortojn por novaj nocioj aŭ aldonas novan signifon al la jam ekzistantaj, aliaj pli uzas la internajn vortkreaĵajn metodojn: kunmetadon kaj derivadon. La deriva metodo kunligas la derivitajn vortojn kun la radikalo, montras la logikajn rilatojn inter ili. La demando estas interesa, ĉu tio iĝas la parolantojn pensi pli logike. La ĉina lingvo – pro sia skribmaniero – interpretas la novajn fremdajn vortojn laŭ signiferoj (ekz. komputilo: 'elektra cerbo', diabeto: 'sukero piso').

### 3.2.1 Interpreto de derivitaj vortoj

Piron (1987) jam pruvis la lingvan kreivon kaj la subtenon de logika pensado en Esperanto: Oni povas ĝeneraligi la lingvajn trajtojn, kiujn oni lernis kaj tio donas ankaŭ sekurecon (kp Piron 2004). En etnaj lingvoj la lingva kreemo de ĝiaj uzantoj devas cedi al la ofte nelogikaj lingvaj normoj. En Esperanto la analogia pensado sukcese funkcias kaj rezultigas facile travideblan vortprovizon, kaj efikan eluzon de iu baza vort-aro. Estas tamen dezirinde ekzameni, ĉu la Esperantaj derivitaj vortoj estas ĉiam uzataj en sia logika senco. Ĉu krom la logike derivebla signifo de la derivita vorto (devenanta el la signifo de ĝiaj partoj) ekzistas konvenciaj signifoj – kompreneblaj nur post pripensado aŭ por difinitaj kultursferanoj?

La enketilo petis la klarigon kaj nacilingvan tradukon de kvar derivitaj vortoj: *vortaro*, *tranĉilo*, *libraro* kaj *lernejo*. Krom la derivita ĝenerala signifo – kiun oni apenaŭ uzas – tri havas specialan konvencian signifon (tio evidentas ankaŭ el la tradukoj), kiu plej ofte aplikiga, ni nomu ilin *prototipaj signifoj*, tiel:

**vortaro:** krom ‘aro da vortoj’ ĉefe signifas libron, kiu entenas ordigitan vortaron kun klarigoj aŭ alilingvaj ekvivalentoj, t.e. An ‘dictionary’;

**tranĉilo:** krom ‘ilo por tranĉi’ ĉefe signifas specialan tranĉilon uzatan por tranĉi ekz. manĝaĵojn, t.e. An ‘knife’;

**lernejo:** krom ‘ejo por lerni’ ĉefe signifas specialan institucion, kien lernantoj iras por lerni kaj instruistoj instruas, t.e. An ‘school’.

**libraro:** ne havas konvencian specialan signifon, ĉar ekzistas bazaj vortoj por la eblaj du ĉefaj interpretoj – biblioteko kaj librovendejo. Tiel ĝi konservas sian ĝeneralan signifon ‘aro da libroj’, ‘librokolektaĵo’.

La respondoj montras, ke oni uzas la vortojn kun la speciala signifo. Se ne ekzistas konvencia prototipa signifo, tiam la signifo de la derivita vorto estas ĝenerala, iom svaga, nur el la kunteksto pli precize komprenebla. Mi eĉ kuraĝus diri, ke la derivitaj vortoj pli ofte havas iun plusvaloron krom la sumo de la signifoj de la vorteroj. La plusvaloro estas la plej verŝajna, sed tamen konvencia signifero – nedifinebla antaŭe. Se oni bezonas la ĝeneralan signifon, tiam ofte alia vorto estas uzata, ekz. *lernoĉambro* por esprimi iun ajn ejon, kie oni lernas, ĉar *lernejo* estas uzata en la specifa signifo, aŭ *vortokolekto*, *vortolisto* por aro da vortoj (kp. Koutny 2001). Fakte same aŭ eĉ pli bone povus taŭgi *instruejo* por *lernejo*, ankaŭ la difino ofte entenas la elementon de instruado, sed la uzo konvenciigis la unuan. La signifo de *libraro* ne estas konvencia, tial la plejmulto klarigis ĝin kiel ‘librokolektaĵo’, tamen sufiĉe multaj interpretis ĝin kiel ‘biblioteko’ (iuj aldonis, ke ne temas pri ‘konstruaĵo’), iuj ne certis pri la signifo.

Menciendas ankaŭ la eŭfemismoj *postaĵo*, *necesejo*, kies signifo enleksikiĝis. Ekzistas ankaŭ fremdaj strukturoj, paŭsaĵoj el aliaj lingvoj kiel *libroteni*, *terpomo* – ne kompreneblaj el la signifo de la eroj – kaj aliaj strukturoj ne logikaj pro la rekta transpreno el aliaj lingvoj, kiel *lingvistiko*, pro tio kelkaj uzas la formon *lingviko*. Analogio kaj logikemo reaperas en la lingvo.

### 3.2.2 Kreo de derivitaj vortoj

La enketilo testis la uzon de derivitaj vortoj far esperantistoj petante ilin doni alian vorton por la nederivitaj vortoj *hospitalo*, *ganto*, *ĉipa* kaj *kompili*.

**hospitalo:** 89%-oj donis la kutiman nomon *malsanulejo*, krome *kuracejo*: 3 kaj *resaniĝejo*: 2.

**ganto:** manke de ĉiutage uzata sinonimo aperis tre variaj solvoj:

*maningo*: 7, *manujo*: 6, *mankovrilo*: 6, *manvestaĵo*: 5, *manvesto*: 16, *manŝuo*: 14 kaj sporade *manprotektilo*, *manŝirmilo*, *manŝtrumpeto*, *mansako*, 15%-oj ne trovis ekvivalenton por *ganto* aŭ ne konis la vorton.

**kompili:** *kunmeti*: 39%-oj, *redakti*: 13%, *kolekti* (kun iu aldono): 11% kaj *arigi*: 5%.

El la respondoj vidiĝas, ke la plejmulto trovas la kutiman derivitan vorton kiel *malsanulejo* (89%), kiu estas praktike enleksikiĝinta kaj konvencie uzata, kvankam ankaŭ la du aliaj solvoj – *kuracejo*, *resaniĝejo* – taŭgus (en la ĉina estus ‘kurac-ejo’, en la hungara ‘malsan-domo’). Sufiĉe multaj uzis la kutiman *kunmeti* (39%) kiel sinonimon de *kompili*.

La nekonvenciajn derivaĵojn malmultaj trovis (*manujo*: 6%, *maningo*: 7%). Neatendite multaj, 15%-oj, eĉ ne trovis sinonimon, kvankam la logika signifo de *manujo* permesus esti sinonimo por *ganto* (vd. ĉina ‘man-ujo’). Sufiĉe multaj uzis kunmetitajn vortojn esprimante

la funkcion de ganto kiel *mankovrilo* (6%), *manvest(af)o*: 21%. Kelkaj skribante *manŝuo*, aldonis, ke tio estas germanismo.

El 3.2.1 kaj el tio ĉi evidentiga, ke la derivitaj vortoj estas kutime ĝuste komprenataj, sen kunteksto en sia prototipa (specifa) signifo, sed libere derivitaj vortoj ne ĉiam trafas la konvencian uzon, kaj kelkaj ne kuraĝas eĉ libere derivi vortojn, se jam ekzistas konvencia formo.

### 3.2.3 Produktiveco de vortoj

El la strukturo de Esperanto sekvas, ke facile oni povas krei novajn vortojn, se semantike tio havas sencon. Estas interesa montrilo, kiom da kutimaj vortoj oni povas krei el baza vorto (por kiuj eblas trovi naciajn ekvivalentojn). Tiun kapablon mi nomas **produktivo** aŭ **signifovalento** kaj komparas ĝin kun la angla kaj hungara sube (parenteze aperas, kiom da vortoj fareblas en la angla kaj hungara), ekz:

- tero** (earth, föld): ~a (earthly, földi), ekster~a (extraterrestrial, földönkívüli), sub~a (underground, földalatti), sur~a (ground-, földi), super~a (overground, földfeletti), sen~a (landless, föld nélküli), trans~a (unearthly, földöntúli) 7 (2, 7)  
 ~aĵo (bank, földhányás > ~aĵisto, navvy, földmunkás) 2 (0, 2)  
 al~iĝi (land, leszáll), de~iĝi (take off, felszáll), sur~iĝi (land, leszáll), al~igi (earth, földel), en~igi (bury, eltemet > en~igisto 'gravedigger', sírásó), el~igi (dig out, kiás), el~iĝi (come out from the earth, kibújik a földből) 8 (1, 1)
- lerni** (learn, tanul): ~a (learning, tanuló), ~ema (diligent, szorgalmas), ~iva (teachable, tanulékony), ~ebla (could be learned, megtanulható), -inda (worth learning, érdemes megtanulni), -enda (is to be learnt, megtanulandó) 6 (1, 4)  
 ~(ad)o (learning, tanulás), ~anto (pupil, tanuló), ~antino (pupil, tanulólány), kun~anto (schoolmate, tanulótárs), mem~into (autodidact, autodidakta), ~aĵo (things of studying tanulnivaló), ~ejo (school, iskola), ~ilo (teaching tools, tanszer), 8 (1, 5)  
 el~ (learn thoroughly, megtanul), ~igi (teach, tanít), ~egi (swot, magol) 3 (1, 1)
- rapida** (quick, gyors): mal- (slow, lassú), -ega (speedy, sebes), -ema (flustered, kapkodó) 3 (0, 0)  
 ~(ec)o (speed, gyorsaság), -umo (gear, sebesség) 2 (0, 1)  
 -i (hurry, siet), -igi (accelerate, gyorsít), -iĝi (accelerate, gyorsul) 3 (0, 2)

La vortkrea aliro de Esperanto enfokusigas parton de la vortoprovizo kaj ligas al tio la aliajn vortojn, tiel la signifovalento, la asocieblo de bazaj vortoj, estas pli granda ol en etnaj lingvoj. La malvortoj kunigas la antonimojn, ili enhavas iun nean karakteron. Se kompari la procezon kun la angla, videblas granda diferenco, la hungara troviĝas inter la du lingvoj.

## 4. Lingva bildo de la mondo en leksiko

### 4.1 Mapado de la mondo en la leksiko


La lingva bildo bone videblas **kiel la mondo estas mapita en la leksiko**. Krom la jam menciitaj *arbo* – *ligno*, aŭ la distingo inter la besto kaj la viando (*porko* – *porkaĵo* en la angla *pig* – *porc*) aŭ *haŭto* kaj *ledo*, kie temas pri distingo vivanta – nevivanta, estas karakterize, kiel la lingvoj segmentas la kolorojn. Kiom da bazaj koloroj nomas la lingvo? 11 bazaj koloroj estas trovitaj far B. Berlin kaj P. Kay (Fiedler 2002). La pola havas apartajn vortojn por 'helblua' *blękitny*, 'ĉielblua' *niebeski* kaj 'malhelblua' *granatowy*, kaj la japana unu vorton por 'blua' kaj 'verda' *aoi*.

En Esperanto ekzistas ok bazaj **koloroj**: *nigra, blanka, ruĝa, flava, blua, verda, bruna, griza*. Aliaj koloroj esprimiĝas per kunmetaĵoj: *rozkolora, oranĝkolora, violkolora* ktp. Se aliaj aperas memstare, tiam ili estas plursencaj vortoj: *roza, viola, oranĝa, ora, arĝenta* ktp. La **verdo** havas specialan rolon, ĝi simbolas Esperanton mem en la esprimoj: *verda stelo/standardo/popolo/lingvo/movado* ktp. Samtempe ĝi estas ankaŭ la simbolo de la ekologia movado. Ĝi povas simboli nematurecon (*verdaj fruktoj*, Hu: *zöldfűlű* ‘verdorelulo’: verdbekulo) kaj ankaŭ permeson, liberan vojon (*verda lumo*, Hu: *zöld határ* ‘verda limo’: libera limo).

La simbolecon de nigra kaj blanka esprimas PIV, kaj parte subtenas tion la frazeologiaĵoj trovitaj far Fiedler (2002). Parto certe ne apartenas al la scio de averaĝa esperantisto: *blanka edziĝo, blankaj versoj, blanka operacio/akcepto/kredito/vendo, havi blankajn manojn* – ili devenas el aliaj lingvoj.

La problemo kuŝas ankoraŭ pli profunde, nome ni vidas la mondon en iom aliaj koloroj – determinite de nia baza kulturo. La enketilo demandis la kolorojn de kvar objektoj. La respondoj montras sufiĉe koloran bildon (vd. figurojn 3-4). La suno povas esti flava (61%), blanka (10%), ruĝa (10%), orkolora (17%), oranĝa (15%) se kalkuli ankaŭ pluroblajn menciojn. Azianoj plejparte konsideris ĝin ruĝa.

Cepo povas esti ekstere ruĝa (16%), bruna (21%), flava (11%) kaj viola (4%), interne blanka (53%) kaj la tigo verda (5%) (tion hungaroj nomas *zöldhagyma* ‘verda cepo’). Tie ĉi la tipa respondo de hungaroj estas *ruĝa*, ja la hungara nomo entenas la vorton *ruĝa*. Ankaŭ sablo vidatas diverskolora: flava, blanka, bruna, griza. La statistikan prilaboron malfaciligas, ke kelkaj donis plurajn respondojn, krome ne estis specifite, ĉu temas pri ekstero aŭ interno de cepo, mi scivolis pri la stereotipa bildo de cepo.




Figuro 3: Tipa koloro de la suno

La **familiaj rilatoj** montras sociajn rilatojn en la lingvokomunumo. En hindeŭropaj lingvoj plej gravas la distingo inter viro kaj virino (An: *brother – sister*, Fr: *frère – soeur*, Pl: *brat – siostra*), en aziaj lingvoj la aĝo (ankaŭ en la hungara: *báty/öcs – nővér/húg*)

En la mapado de la mondo Esperanto sekvas siajn fontolingvojn, do havas eŭropan aliron, kie gravas ekz. la distingo inter viro/virino, vivanta/nevivanta. Kiam necesis limigo de la senco de la vorto, tiam ekfunkciis slavaj influoj ĉe Zamenhof (Szerdahelyi 1976).





Figuro 4: Tipa koloro de cepo

## 4.2 Konsisto de vortoprovizo

La **konsisto de vortoprovizo** malkovras la bazajn elementojn de la ĉiutaga vivo:

- realaĵoj de la vivo (manĝaĵoj, vestaĵoj, uzataj iloj, socia hierarkio, agadoj),
- kiuj terenoj estas gravaj aŭ disvolvitaj (neĝo ĉe eskimoj, kamelo ĉe araboj), la nombro de sinonimoj montras tion,
- tabuoj, eŭfemismoj ktp.

Etimologio malkovras malnovan lingvan bildon kaj skizas evoluon. Pruntvortoj rilatas al ŝanĝo de epoko: aperas novaj nocioj, necesas novaj vortoj – per interna kreado aŭ ekstera pruntado – aŭ nova interpreto de la malnovaj.

### 4.2.1 Kulturdependaj vortoj

En Esperanto neglekteblas la nombro de specialaĵoj de la ĉiutaga vivo, ĉar mankas tiutipa speciala Esperanto-kulturo (vd. Koutny 1998, kvankam Melnikov 2001 prezentas kelkajn); iuj specialaĵoj eniris el aliaj lingvoj (gulaŝo, kimono, barŝĉo ktp.). Ekzistas tamen kultureroj, kiuj rilatas al la esperantista vivo, kaj ili konsistigas specialajn Esperantajn vortojn kaj esprimojn, kiujn ni povas nomi esperantismoj. Jen kelkaj vortoj (esprimoj en 4.3):

*samideano, delegito, ĝisostulo, praelano, finvenkisto, denaskulo, ago-tago, kabe(iĝ)i, krokodili, aligatori, zeo, UK...*

Kutime (ankaŭ ĉe Fiedler 2001) nur esprimoj (kombino de almenaŭ du vortoj) estas konsiderataj frazeologiaĵoj, sed pro la sinteza karaktero de Esperanto unu vorto mem povas montri semantikan plusvaloron, kompreneblan nur surbaze de kultura fono (en la francan aŭ anglan transmeteblan nur per plurvortaj esprimoj, se entute). Tion montras ankaŭ la testo de komprenebleco de unuvortaj esperantismoj:

**kabe(iĝ)i:** 8%-oj ne komprenis

**finvenkisto:** 3%-oj ne komprenis kaj kromaj 6%-oj donis misan respondon

Du el la kvar denaskuloj ne komprenis la signifon de *kabe(iĝ)i*. Tio klare montras ties kulturdependecon, kiun oni akiras per la partopreno en la movado manke de Esperanta instrusistemo.

La ofteco de vortoj en tekstoj povas ankaŭ montri ion pri la specifeco de la aliro. Por tio necesus komparaj korpusaj esploroj inter Esperanto-tekstaro kaj alilingva. Supozeblas, ke *klubano, prezidanto, estrarano, delegito, kunveno, kongreso, vojaĝo, aliĝilo, kotizo, partopreni, stelo, kurso, lerni, lingvo, facila, logika, venki, defendi, elekti, korespondi* kaj similaj aperas multe pli ofte en ĝenerala Esperanta tekstaro ol en nacilingva.

#### 4.2.2 Metaforiĝo

La metafora uzo de diversaj vortoj estas kutima lingva fenomeno, ĝi aperas ankaŭ en planlingvo kaj tion jam antaŭdiris Ferdinand de Saussure (Horváth 1997). Horváth analizas vicojn kiel *azeno, ansero* en la senco de 'stultulo', *elbuŝigi, vortumi, tuŝi, draŝi* en la senco de 'diri', kaj ŝi konstatas, ke Esperanto montras similan bildon kiel la etnaj lingvoj, t.e. vortoj, kiuj en konkreta senco diferencas, povas sinonimi en metafora senco. Pri ilia ĝenerala valideco en la Esperanto-komunumo necesus pli vaste enketi, mi spuris nur kelkajn:

**azenaĵo:** 'stultaĵo'; preskaŭ ĉiuj tiel komprenis, nur 2 homoj ne, kaj 4 konsideris ĝin nur kiel azenan viandaĵon.

**porkeco:** 8%-oj ne komprenis la vorton, aliaj interpretis laŭ diversaj porkaj ecoj, kiel 'malpureco', 'maldeco' aŭ 'tromanĝemo'.

**forlepори:** kvankam 26%-oj deklaris ne kompreni ĝin, la aliaj sufiĉe unusence klarigis la signifon: 'timeme forkuri' (relative multe da germanlingvanoj ne komprenis ĝin).

La metafora uzo fontas ĉefe el la ecoj de la bestoj, kiuj similas en diversaj kulturoj. La maldeco kaj fieco de porko estas jam sekva paŝo de abstraktado el la malpureco.

#### 4.2.3 Vortiĝo de nocioj – sintezeco

Nocioj diversmaniere vortiĝas en diversaj lingvoj (kiel substantivoj, verboj aŭ adjektivoj), en Esperanto eblas vortiĝo en ĉiuj vortospecoj, kvankam ne ĉiuj estas same ofte uzataj – tio donas grandan elastecon. Ekz. la hungara, angla kaj germana uzas adjektivan formon 'malsata', sed la franca uzas substantivon kun 'havi'; en Esperanto eblas ambaŭ formoj kaj ankaŭ la verba.

Eo	An	Ge	Fr	Hu
esti malsata, malsati havi malsaton	be hungry	hungrig sein	avoir faim	éhes

La **rekta verbigo** karakterizas Esperanton (kp Piron 1989): *vojaĝi per taksio, taksii ien*. La **sintezaj formoj** kiel *ellitiĝi, altabligi, malindulino* fontas el la fleksebla deriva sistemo de Esperanto. Laŭ Piron en tiuj formoj manifestiĝas la spirito de la lingvo kaj la lingvo evoluas en tiu ĉi direkto.

### 4.3 Speguliĝo en lingvaj esprimoj

La lingva bildo de la mondo pli speciale vidiĝas en kutimaj esprimoj (An: collocation), fiksiĝintaj frazeologiaĵoj kaj proverboj. Ĉiuj kune – specialaj vortoj, fiksjaj esprimoj kaj proverboj – povas esti nomataj *esperantismoj* aŭ en vasta senco *frazeologiaĵoj*. Melnikov, parolante pri la fonaj scioj de tipa esperantisto, donas gravan rolon al la lingvaj aspektoj, li konsideras esperantismoj "specialajn vortojn kaj frazeologiaĵojn kiuj respegulas apartaĵojn de la Esperanto-movado" (Melnikov 1992: 86).

#### 4.3.1 Kutimaj esprimoj

La Esperantaj kutimaj esprimoj estas travideblaj, t.e. kompreneblaj el la signifo de la partoj, tamen unu el la eblaj vortoj estas kutime uzata en la esprimo. En etnaj lingvoj tiuj esprimoj

havas fiksan formon, kutime nur unu el la eblaj vortoj estas ĝusta. En Esperanto tiuj esprimoj ne tiomgrade fiksiĝis kaj pluraj ebloj konkurencas pro la influo de diversaj gepatraj lingvoj de la uzantoj. Mi esploris la uzon de kvar tiaj kutimaj esprimoj proponante kelkajn solvojn. La rezultoj montras, ke en Esperanto kunekzistas pluraj versioj malsame al la etnaj lingvoj ne nur en la parolkomunumo, sed ankaŭ individue, la parolantoj mem akceptas kaj uzas diversajn formojn (mi donos la hungarajn kaj anglajn esprimojn por kompari):

**akra/pik(ant)a papriko** (Hu: *erős* ‘forta’, An: *hot* ‘varmega’): 34%-oj uzis *akra* en la unua loko por papriko, 29%-oj *pikanta*, 20% *pika* kaj 11% *forta*, kelkaj skribis, ke neniu el tiuj estas konvena kaj iu, ke ĉiuj. *Forta* cedis al *akra* ĉe hungaroj male al la atendoj, kaj anglalingvanoj uzis ĝin same ofte kiel *pika*.

**grava/serioza malsano** (Hu: *súlyos* ‘peza’, An: *serious* ‘serioza’): 60%-oj uzis *grava*, 33%-oj *serioza*, preskaŭ ĉie la plimulto uzis la unuan vorton, sed ĉe poloj kaj rusoj *serioza* gajnis – tio estas ankaŭ la gepatralingva uzo. *Peza* aperis nur kvinfoje dise.

**starigi demandon** (Hu: *feltesz* ‘suprenmetas’, An: *ask* ‘demandi’): la plejmulto, 54%-oj, uzis *fari*; sufiĉe ofte, en 32%-oj, aperis *starigi*, sed *meti* (9%) kaj *doni* nur sporade.

**trapasi ekzamenon** (Hu: (*le*)*tesz* ‘(suben)metas’, *take* ‘preni’): 60%-oj uzis *fari*, 33%-oj *trapasi*, preskaŭ ĉie la plimulto uzis la unuan vorton, nur la anglalingvanoj preferis *fari* en signifa maniero.

#### 4.3.2 Fiksaj esprimoj

Fiksaj esprimoj, frazeologiaĵoj povas fondi el aliaj lingvoj kaj el la Esperanta movado mem (kp. Fiedler 2001). La internaj frazeologiaĵoj estas nun interesaj, ĉar ili karakterizas la Esperanto-kulturon, la specialan bildon, kiun esperantistoj havas pri Esperantio. Jen kelkaj:

*eterna komencanto, dumviva membro, kongresa edzino,  
nepagipovaj landoj, Pasporta Servo, laste, sed ne balaste,*

En la esperantlingva bildo de la mondo la lingvo kaj la movado ludas gravan rolon, kiu esprimiĝas ankaŭ en tiuj ĉi esprimoj. Mi enketis kelkajn, kiomgrade ili estas konataj, ekz.:

**kongresa edzino:** ‘dumkongresa kunulino’, 18%-oj ne komprenis, krome 9%-oj miskomprenis (‘neesperantista edzino dum kongreso’ aŭ ‘edzino, kiun iu ekkonis dum kongreso’), 3 el la 4 denaskuloj ne komprenis ĝin.

Simbolaj esprimoj kiel *hunda vivo, rana perspektivo, formika diligento, krokodilaj larmoj* en Esperanto devenas el aliaj lingvoj, tamen ne nepre estas universalaj, tial ilia kompreno far la parolkomunumo estas internacie limigita. Kelkfoje la frazeologiaĵo tradukita el nacilingvo ne estas komprenebla por alinacilingvanoj (ekz. Pl *ursa kareso*). En la enketilo mi spuris la kompreneblecon de kelkaj tiaj frazeologiaĵoj: *formika diligento, rana perspektivo, lupa malsato, leona kuraĝo*:

**formika diligento:** kiel ‘senlaca laboremo’ komprenata far 98%-oj.

**rana perspektivo:** kaŭzis problemojn al 33%-oj, sed la aliaj enketitoj konverĝis al ‘malvasta horizonto’, ‘nesufiĉa klarvido’.

La **vortludoj** devenas de la interna strukturo de la lingvo, el ĝia produktiva derivsistemo, multaj baziĝas sur la diversaj interpretebloj de la vortoj aŭ esprimoj: kiel unu vorto kaj kiel derivita aŭ kunmetita vorto (*kolego* – *kol-ego*, *bandaĝo* – *band-aĝo*, *sen-tema* – *sent-ema* ktp.). Melnikov (2003, 2004) detale analizas diversajn tipojn de vortludoj validajn en Esperanto kaj etnaj lingvoj. Li trovis multajn paronimojn esplorante Esperanto-tekstojn, kiel jam la titolo *Esperanto aŭ edzperanto* montras tion, sed ankaŭ plurelementajn, ekz. *Kaj ilia paradizo fariĝis para diso*.

#### 4.4 Lingvaj stereotipoj

Interesa, sed eĉ pli kultur- kaj lingvodependa tereno estas, kiel oni imagas, personigas diversajn fenomenojn. La enketo petis personigi la sekvajn: *tero, suno, luno, morto, vivo* (figuro 5). La genro en la gepatra lingvo kaj kutimaj kaj artaj prezentoj de la nocioj havas gravan rolon, en kiu formo ili personiĝas. Plurlingvaj homoj ne tiom ligiĝas al ununura kultura imago. La ĝenerala bildo surbaze de la enketo montras, ke la suno estas prefere energie vira, la luno virina kaj la morto maljunulo sen seksa specifo, la vivo ligiĝas al virinoj kaj infanoj. Tamen vidiĝas, ke novlatinlingvanoj preferas imagi la sunon kiel viron (kie ĝia genro estas vira), germanoj kiel virinon (kie ĝia genro estas ina) kaj poloj kiel infanon aŭ senseksan (kie ĝia genro estas neŭtra).

	<b>suno</b>	<b>luno</b>	<b>vivo</b>	<b>morto</b>
<b>viro</b>	44%, It, Hi, Fr, An, Hu	23% Ge	5%	13%
<b>virino</b>	20%, Ge	53%, Hi, It, Fr, An, Hu	21%	18%, Ru, Pl
<b>infano</b>	4%, Pl	1%	24%	1%
<b>persono senseksa aŭ egala, kia</b>	18%	13%	14%	55%
<b>aliaj karakterizoj</b>	forta, potenca, energia, brila, gaja, juna – maljuna reĝo, dio	pala, malgaja, malsana, mistera, juna – maljuna; elegante, blanke vestita	vigla, aktiva, gaja, juna – maljuna	maljuna, pala, kaduka; nigre vestita, maldika skeleto kun falĉilo

Figuro 5: Personigo de suno, luno, vivo kaj morto (en procentaĵoj kaj ĉefaj uzantoj laŭ gepatra lingvo)

**Rimarko:** La vortojn maljunulo, dikulo ktp mi konsideris senseksaj.

## 5 Lingva bildo de la mondo en lingvouzo

### 5.1 Konotacio

La konotacio aŭ kromnocio elvokas ion aldonan krom la envortarigita signifo, ĝi dependas de la lingvokomunumo, kie ĝi estas uzata. Alie estas konceptata *demokratio* en lando, kie regas demokratia reĝimo kaj kie ne. La vorto *hejmo* povas elvoki la senton de sekureco, familio, amo, komforto. Ekzemple en Esperanto la vorto *profesoro* estas la plej alta universitata pozicio, tamen en pluraj aliaj lingvoj ĝi elvokas la bildon de ĝenerala instruisto. Nur la vortoj karakterizaj por la Esperanto-kulturo elvokas speciale Esperantajn signifojn, kiel *verda* ion rilatan al Esperanto, *kongreso* UK-on, *delegito* UEA-delegiton, *klubano* membron de Esperanto-klubo, ktp.

### 5.2 Lingva ĝentileco

En la interpersona komunikado gravas ne nur tio, kion oni diras, sed ankaŭ tio, kiel oni diras. Gramatike bona, sed laŭ la cirkonstancoj ne konvena komunikado riskas ne atingi sian celon. La interhomaj rilatoj kiel diferenco de aĝo, sekso, socia statuso, intimeco de la rilato estas diversgrade koditaj en la lingva sistemo. Kutima estas la distingo inter formalaj kaj neformalaj lingvaj formoj, kiuj manifestiĝas en la salutoj, alparoloj, verbaj formoj ktp. En aziaj lingvoj, ekz. la japana, ekzistas komplikaj sistemoj de honorajoj, kiuj enkonstruiĝas en la interparolon. La akcepto kaj rifuzo de petoj, gratuloj kaj kondolencoj ktp. havas siajn lingvajn formojn karakterizajn por la koncerna kulturo.

En Esperanto ne estas striktaj limoj inter formala kaj neformala komunikado, ja la aparteno al la sama grupo – kies ĉefa karakterizo estas la akcepto de komuna lingvo por internacia kaj interkultura komunikado kaj kredo en ties taŭgeco kaj valoroj – kreas iun solidarecon, kies sekvo estas la pli neformala lingva komunikado. Ankaŭ la fakto, ke kutime Esperanto ne estas la gepatra lingvo de la interparolantoj, elformas egalecan senton, kvankam ankaŭ inter la parolantoj de Esperanto povas esti grandaj diferencoj en la lingvoscio.

Mi jam analizis diversajn salutojn kaj alparolformojn (Koutny 1998). *Saluton!* kaj *Ĝis!* estas pli intimaj formoj, tamen la uzo de la unua ne estas limigita al geamikoj. La alparoloj povas enteni *s-ro/s-ino*, aŭ la specialan *samideano*, sed en pli proksima rilato la persona nomo estas plej ofte uzata, do la solidareco kaj egalrangeco superas la hierarkion. Tre ĝeneraligante eblas ankaŭ diri, ke la eŭropaj kaj usonaj kutimoj venkas super la aziaj. Titoloj malofte estas uzataj. La reto – kiu havas elstaran rolon en la interkomunikado de esperantistoj – instigas la uzon de senperaj formoj.

La prezento de manĝaĵo kaj trinkaĵo al gastoj malsamas en ĝermanaj landoj kaj en Pollando aŭ Hungario: la unuaj proponas al la gastoj kiel *Would you like to take a piece of cake?* ‘Ĉu vi volus preni kukopecon?’ respektante ilian privatecon. La gasto decidas, ĉu li volas aŭ ne, la gastiganto ne insistas. En la aliaj du landoj la gastiganto insistas pri bona prizorgo de la gasto sendepende de ties deziro kaj tio esprimiĝas en la pli rektaj ofertoj *Prenu kukopecon! Ĉu vi manĝas kukon?* En Esperanto la simpla *Bonvolu preni kukon!* sufiĉas kaj la insistado dependas tamen de la gastiganto kaj ties landaj kutimoj.

La petoj kaj ilia akcepto aŭ rifuzo havas siajn kutimajn scenarojn en diversaj lingvokomunumoj. Ekzistas pli malfermitaj komunumoj, kie la rifuzo estas senpera, kompreneble en ĝentila formo kun aldonaj klarigoj kaj proponoj (usona, germana, hungara). En aliaj (ĉefe en aziaj) la rifuzo estas evitata. Ne ekzistas unueca kondutmaniero inter esperantistoj.

## 6 Konkludoj

Nur skize mi prezentis la terenojn, kie eblas analizi la esperantlingvan bildon de la mondo. El la esploroj leviĝas pli da demandoj ol firmaj respondoj, kiujn indus pli pripensi kaj esplori. La malgrandskala enketo, la retaj serĉoj kaj la pridemando de Esperanta korpuso montras la eblojn kaj direktojn, kiujn mi povus tiel resumi:

- Tendenco al sekse neŭtralaj bazaj vortoj. Se necese, oni formas sekse markitajn elementojn (per *-in* virinon, sed mankas akceptita simetria vira markilo).
- La regula vortfarado ofte kondukas al vortoj, kies tipa uzo koncentriĝas al ilia prototipa signifo (*lernejo* kiel institucio, kie oni instruas). Se oni havas jam konvencian vorton, la vortfaremo malpli aktivas.
- Kelkcent bazaj vortoj havas grandan rolon en la vortoprovizo, ĉar al ili ligiĝas kelkmil aliaj per la vortfarado (vd. la derivaĵojn de *tero!*).
- En la mapado de la mondo Esperanto sekvas siajn fontolingvojn, do eŭropan aliron, kie gravas ekz. la distingo inter viro/virino, vivanta/nevivanta. Kiam necesis limigo de la senco de la vorto, tiam ekfunkciis ankaŭ slavaj influoj. Tamen en la plukonstruo de la vortoprovizo validas la sinteza karaktero de Esperanto, kiu forme kunligas la semantike rilatajn vortojn.
- Ekzistas unu- kaj plurvortaj esperantismoj, kies kompreno eblas nur surbaze de konoj pri Esperanto-kulturo (*kabeiĝi*, *finvenkisto*, *kongresa edzino*)
- Multaj aliaj vortoj havas specialan Esperantan konotacion kiel *verda*, *klubano*, *delegito*, *aliĝilo*.

- La vortiĝo de nocioj estas sufiĉe libera en Esperanto, kiu donas liberecon al ĝiaj uzantoj: uzeblas kaj uzatas analizaj kaj sintezaj formoj. La rektaj verbigoj (ekz. *taksii*), same la sintezaj vortformoj (*samdomano*, *malindulino*) estas tipaj kaj koncizaj, ilia uzo plioftiĝas.
- Metaforoj kaj stereotipoj baziĝantaj sur universalaj ecoj apartenas al la Esperanta mondobildo (*azenaĵo*, *formika diligento*).
- Kulturaj simboloj limiĝas al diversaj kulturoj, ili ne estas same komprenataj en Esperanto, krom se ili fontas el la Esperanto-kulturo mem (sed ili ne estas konataj al ĉiu membro de la esperantlingva komunumo, ekz. *kongresa edzino*).
- La lingvouzo montras prefere la solidarecon, senton de komuneco en la lingvo-komunumo, tial la interagoj estas neformalaj (uzo de persona nomo), tamen ne ekzistas klaraj normoj.

Sume, vidiĝas gepatralingvaj influoj en la lingvouzo kaj en la pensmaniero de Esperanto-parolantoj (ekz. vido de koloroj), tamen klare manifestiĝas tendencoj al simila uzo kaj kompreno de esprimoj kaj elformiĝo de konceptoj. La sintezaj formoj havas specialan rolon esprimi semantikan plusvaloron en unu vorto kaj rilaton inter nocioj. Esperanto havas memstaran lingvan sistemon, kiu evoluas laŭ internaj leĝoj, kaj elformiĝas komuna kultura bazo fontante el la komuna homa kaj el la speciala Esperanta. Necesus unuflanke pli grandskala kaj pli detala enketo, aliflanke granda kaj multflanka Esperanta reprezenta korpuso por havi pli fidindajn datumojn por montri ties karakterizojn.

## Bibliografio

- Anusiewicz, Janusz; Anna Dąbrowska, Michael Fleischer (2000): “Językowy obraz świata i kultura. Projekt koncepcji badawczej” (Lingva bildo de la mondo kaj kulturo. Projekto de esplorkoncepto). En: Anna Dąbrowska, Janusz Anusiewicz (red.), *Językowy obraz świata i kultura*. Wrocław: Wydawnictwo Uniwersytetu Wrocławskiego (Język a kultura, 13), p. 11-44 (ankaŭ en: <http://www.lingwistyka.uni.wroc.pl/jk/>).
- Auld, William (1986): *Kulturo kaj internacia lingvo*. Chapeco: Fonto.
- Bañcerowski, Janusz (1999): “A világ nyelvi képe mint a szemantikai kutatások tárgya” (La lingva bildo de la mondo kiel la objekto de semantikaj esploroj). En: *Magyar Nyelv*, n-ro 2, p. 188-195; <http://www.c3.hu/~magarynyelv/99-2/banczer.html>.
- Fiedler, Sabine (2002): *Esperanta frazeologio*. Roterdamo: UEA.
- Fischer, Rudolf-Josef (2003): “Sexusneutrale und sexusindizierende Bezeichnungen”. En: Detlev Blanke (red.), *Plansprachen und elektronische Medien..* Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik (Interlinguistische Informationen, Beiheft 9), p. 110-149.
- Horváth, Katalin (1997): “Pri la interrilato inter polisemio kaj sinonimio”. En: Ilona Koutny; Márta Kovács (red.), *Struktura kaj socilingvistika Esploro de Esperanto*. Budapeŝto: Steleto & ILEI, p. 55-60.
- Iĉisma Esperanto (Reguligo kaj senseksismigo de Esperanto). <http://www.pvv.org/~ulflunde/Eo/icxismo.html>.
- Koutny, Ilona (1998): “Interkultura komunikado”. En: Amri Wandel (red.), *Internacia Kongresa Universitato. 1-7 aŭgusto 1998 Montpeliero*. Roterdamo: UEA, p. 9-20; <http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/artikoloj/INKO-03.htm>.
- (2001): “Defioj de moderna leksikografio por Esperanto”. En: Sabine Fiedler, Liu Haitao (red.), *Studoj pri interlingvistiko. Festlibro omaĝe al la 60-jariĝo de Detlev Blanke. Studien zur Interlinguistik. Festschrift für Detlev Blanke zum 60. Geburtstag*. Dobřichovice ĉe Prago: KAVA-PECH, p. 660-674.
- Melnikov, Aleksander (1992): *Specifaj kulturaj scioj de la esperantista kvazaŭetno kaj ilia respuguliĝo en la koncerna lingvaĵo*. Rostov-na-Donu: Melnikov.

- (2001): “Elementoj de originala esperanto-kulturo kaj ilia lingva reflektiĝo”. En: Detlev Blanke (red.), *Esperanto kaj kulturo – sociaj kaj lingvaj aspektoj. Aktoj de la 19-a Esperantologia Konferenco en la 81-a Universala Kongreso de Esperanto, Prago, 1996*. Roterdamo: UEA, p. 33-46.
- (2003): “Esperanto aŭ edzperanto. Kelkaj aspektoj de vortludoj kaj luda komunikado en Esperanto”. En: *Irana Esperantisto*, n-ro 5 (aŭtuno), p. 16-19.
- (2004): *Lingvokul'turologičeskie aspekty planovych meždunarodnyh jazykov (na fone etničeskih jazykov)*. Rostov-na-Donu: Izdatel'stvo Rostovskogo gosudarstvennogo pedagogičekogo universiteta.
- Piron, Claude (1987): “Créativité et expression linguistique”. En: Michel Duc Goninaz (ed.), *Studoj pri la internacia lingvo. Études sur la langue internationale. Studies on International Language*. Gent: AIMAV, p. 145-153.
- (1989a): *La bona lingvo*. Vieno: Pro Esperanto / Budapeŝto: HEA.
- (1989b): “Who are the speakers of Esperanto?” En: Klaus Schubert (ed.), *Interlinguistics. Aspects of the Science of Planned Languages*. Berlin: Mouton de Gruyter, p. 157-172.
- (2004): “Tute normala progreso”. En: *Esperanto* 97, p. 30-31, 60-62.
- Riisma Esperanto. En: <http://denizo.opia.dk/la.trezorejo/tekstoj/malnovaj/riismo.txt>.
- Szerdahelyi, István (1976): “La semantika modelo de Esperanto”. En: Zlatko Tišljarić (red.), *Internacia Lingvistika Simpozio. Kumrovec 1975*. Zagreb: IKS, p. 85-148.
- Wennergren, Bertilo: “Seksa signifo de vortoj kaj radikoj en Esperanto”. [http://bertilow.com/seksaj\\_vortoj/index.html](http://bertilow.com/seksaj_vortoj/index.html).
- : “Esperanta tekstaro”. <http://tekstaro.com/>
- Wierzbicka, Anna (1991): *Cross-Cultural Pragmatics. The Semantic of Human Interaction*. Berlin, New York: Mouton de Gruyter.

*La esploro kaj la artikolo estis farataj en 2004, la retfontoj estas kontrolitaj en junio 2009.  
Mi tre dankas al Zbigniew Kornicki pro la komputila helpo en la prilaboro de enketiloj.*

## Aldonaĵo: Enketilo

### 0. Personaj datumoj (sennome):

gepatra lingvo:  
 scio de E-o (1: bone; 2: meze; 3: iomete):  
 uzo de E-o (1: ofte (preskaŭ ĉiutage); 2: regule (plurfoje monate); 3: malofte):  
 scio de fremdaj lingvoj (kiuj kaj nivelo 1-3):  
 profesio:

### 1. Transformu la frazojn!

Kiom da homoj loĝas en la lando?  
 Kiom da ..... havas la lando?  
 En Francio oni ŝatas salatojn.  
 ..... ŝatas salatojn.  
 En la lernejo lernas saĝaj infanoj  
 La lernejo havas .....  
 Junaj homoj multe veturas.  
 ..... multe veturas.

### 2. Kian koloron havas?

suno:  
 cepo:  
 sablo:  
 rivero:

**3. Kiun vorton vi uzus prefere (se plurajn, tiam komencu per 1, 2,..; se neuzebla laŭ vi, tiam aldonu 0-on)?**

papriko: ..akra, ..pika, ..pikanta, ..forta  
 malsano: ..peza, ..grava, ..serioza  
 demandon: ..fari, ..starigi, ..meti, ..doni  
 ekzamenon: ..fari, ..meti, ..trapasi

**4. Difinu kaj donu vialingve la sekvajn vortojn!**

vortaro:  
 tranĉilo:  
 libraro:  
 lernejo:

**5. Diru alivorte!**

hospitalo:  
 ganto:  
 ĉipa:  
 kompili:

**6. Diru sinonimojn aŭ klarigu (se nekomprenebla, metu 0-on)!**

formika diligento:  
 rana perspektivo:  
 lupa malsato:  
 leona kuraĝo:

**7. Klarigu (se nekomprenebla, metu 0-on)!**

azenajo:  
 porkeco:  
 forlepori:  
 ĉevaligi iun:

**8. Kion signifas (se nekomprenebla, metu 0-on):**

kabeiĝi:  
 finvenkisto:  
 kongresa edzino  
 civitano

**9. Kiel aspektas la sekvaj, se vi imagas ilin kiel personojn (viro, virino, infano, maljunulo, ...)?**

suno:  
 luno:  
 vivo:  
 morto:

---

**Ilona Koutny**

Nask. 1953 en Hungario, ekde 1997 vivas en Pollando. Diplomiĝis pri matematiko, franca filologio kaj esperantologio, doktoriĝis pri lingvistiko en la Budapeŝta Eötvös-Universitato, habilitiĝis ĉe la Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznań. Post la morto de prof. István Szerdahelyi (1987) instruis en la Esperantofako de Eötvös-Universitato. Instruas en la hungara fako de UAM, fondis en 1997 kaj gvidas la Internaciajn Interlingvistikajn Studojn ĉe UAM. Asista docento ĉe la AIS San Marino, membro de la Akademio de Esperanto. Okupiĝis pri komputila parolprilaboro; kunredaktis *Hungara-Esperanta vortaro* (1996), *Hungara-pola temvortaro* (2000), kaj tri temvortaretojn kun ekzercoj en angla-Esperanta-hungara versio, krome unu en germana-Esperanta-pola versio.

---